

ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA

N-o 8

EL KOMEDIOJ

Fragmentoj el La Revizoro de Gogol
kaj el Georgo Dandin de Molière

Esperantigitaj de
Dro L. L. Zamenhof



Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.
Berlin kaj Dresden

GERMANA ESPERANTISTO

kun instrua kaj literatura aldono

ESPERANTO- PRAKTIKO

Ĉefredaktoro: Friedrich Ellersiek

Respondeca redaktoro: Arnold Behrendt

La plej malnova el la nun ekzistantaj E-gazetoj, redaktata ĉefe nur en Esperanto. Ĝia ĉiam interesa enhavo konsistas el originalaj aŭ tradukitaj artikoloj pri ĉiuj temoj, propagando, kroniko, literaturo, ekzercoj por komencantoj kaj progresantoj, prilingvaj demandoj, konkursoj, bibliografio, korespondo ktp.

Pri abonprezo oni demandu la eldonejon.
Por specimena numero oni sendu 1 novan respond-kuponon.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.

Berlin SW 61, Wilmsstrasse 5

108139

ESPERANTA
BIBLIOTEKO INTERNACIA

N-o 8

EL KOMEDIOJ

Fragmentoj el La Revizoro de Gogol
kaj el Georgo Dandin de Molière

Esperantigitaj de
Dro L.L. Zamenhof

2a eldono
(4a-6a miloj)



1924

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

Tiu ĉi represo estas permesita de
la firmo Hachette & Cie., Paris,
eldoninto de la kompletaj verkoj.

BIBLIOTEKA
UNIWERSYTECKA
w TORUNIU

702450

M. 136/94

La Revizoro

PERSONOJ:

ANTON ANTONOVIĈ SKVOZNIK - DMUĤA-
NOVSKIJ, urbestro.

ANNA ANDREJEVNA, lia edzino.

MARJA ANTONOVNA, lia filino.

LUKA LUKIĈ ĤLOPOV, inspektoro de lernejoj.
Lia edzino.

AMMOS FJODOROVIĈ LJAPKIN - TJAPKIN,
juĝisto.

ARTEMIJ FILIPPOVIĈ ZEMLANIKA, kuratoro de
kadukulejoj.

IVAN KUZMIĈ ŜPEKIN, poŝtestro.

PJOTR IVANOVIĈ DOBĈINSKIJ } urbaj bienhav-
PJOTR IVANOVIĈ BOBĈINSKIJ } antoj.

IVAN ALEKSANDROVIĈ ĤLESTAKOV, oficisto
el S. Peterburgo.

OSIP, lia servanto.

ĤRISTIAN IVANOVIĈ HÛBNER, distrikta kurac-
isto.

FJODOR ANDREJEVIĈ LULUKOV,

IVAN LAZAREVIĈ RASTAKOVSKIJ,

STEPAN IVANOVIĈ KOROBKIN,

eksoficistoj, eminentaj personoj en la urbo.

STEPAN ILJIĈ UĤUVJORTOV, kvartalestro.

Akto unua

Ĉambro en la domo de la urbestro

Sceno Ia

La URBESTRO, KURATORO DE KADUKUL-
EJOJ, INSPEKTORO DE LERNEJOJ, JUĜISTO,
KURACISTO, du POLICANOJ

Urbestro. Mi invitis vin, sinjoroj, al mi,
por komuniki al vi tre malagrablan novaĵon: al
ni venas revizoro.

Ammos Fjodoroviĉ. Kiel, revizoro?

Artemij Filippoviĉ. Kiel, revizoro?

Urbestro. Revizoro el Peterburgo, in-
kognite; kaj ankoraŭ kun sekreta ordono.

Ammos Fjodoroviĉ. Jen vi havas!

Artemij Filippoviĉ. Jen zorgoj mankis
— nun ricevu!

Luka Lukiĉ. Ho, mia Dio! ankoraŭ kun
sekreta ordono!

Urbestro. Mi kvazaŭ antaŭsentis: hodiaŭ
la tutan nokton mi songis pri iaj du ekster-
ordinaraj ratoj. KREDU al mi, tielajn mi neniam
vidis: nigraj, de nenatura grandeco! Ili venis,
ekflaris — kaj iris for. Jen mi tralegos al vi
leteron, kiun mi ricevis de Andrej Ivanoviĉ
Ĉmiĥov, kiun vi, Artemij Filippoviĉ, konas. Jen,
kion li skribas: „Kara amiko, bapto kaj bon-
faranto! (*murmuras duonvoĉe, trakurante rapide
per la okuloj*) ... kaj sciigi vin ...“ Ha, jen:
„mi rapidas, interalie, sciigi vin, ke alveturis

oficisto kun la ordono, revizi la tutan gubernion kaj precipe nian distrikton (*signife levas la fingron supren*). Mi sciiĝis pri tio de homoj plej kredindaj, kvankam li prezentas sin kiel privatan personon. Ĉar mi scias, ke vi, kiel ĉiu, estas ne tute sen peketoj, ĉar vi estas homo saĝa kaj vi ne amas preterlasitajn, kio naĝas al la manoj...“ (*haltante*). Nu, ni estas inter ni ... „tial mi konsilas al vi, aranĝi singardecon: ĉar li povas alveturi en ĉiu horo, se nur li jam ne alveturis kaj ne loĝas ie inkognite ... Hieraŭ mi...“ Nu, tie ĉi jam venas aferoj familiaj: „la fratino Anna Kirillovna alveturis al ni kun sia edzo; Ivan Kirilloviĉ tre dikiĝis kaj ĉiam ludas violonon ...“ kaj tiel plu, kaj tiel plu ... Sekve jen vidu, kia cirkonstanco!

Ammos Fjodoroviĉ. Jes, cirkonstanco eksterordinara, tute eksterordinara. Certe ĝi estas ne sen kaŭzo.

Luka Lukiĉ. Kial do, Anton Antonoviĉ, por kio? Kial oni sendas al ni revizoron?

Urbestro. Kial! Certe jam tia estas nia sorto! (*Ekĝeminte.*) Ĝis nun, dank' al Dio, oni atakadis aliajn urbojn; nun venis la vico al nia urbo.

Ammos Fjodoroviĉ. Mi opinias, Anton Antonoviĉ, ke tie ĉi estas kaŭzo delikata kaj pli politika. Ĝi signifas jenon: Rusujo ... jes ... volas fari militon, kaj la ministraro tial, jen vidu, sendis sekrete oficiston, por sciiĝi, ĉu ne ekzistas ie perfido.

Urbestro. Eh, kien vi ensaltis! Kaj ankoraŭ saĝa homo! En malgranda urbo, perfido! Ĉu

ĝi estas urbo apudlima, he? De ĉi tie vi ja povas eĉ tri jarojn rajdi, vi al nenia regno alrajdos.

Ammos Fjodoroviĉ. Ne, por diri al vi, vi ne tion... vi ne... La estraro havas konsiderojn subtilajn: malgraŭ ke estas malproksime, ĝi tamen notas al si en la cerbo.

Urbestro. Notas aŭ ne notas, sed mi vin, sinjoroj, avertis, — rigardu. En mia parto mi kelkajn disponojn jam faris, mi konsilas ankaŭ al vi. Precipe al vi, Artemij Filippoviĉ! Sendube la traveturanta oficisto volos antaŭ ĉio ĉirkaŭrigardi la kadukulejojn, kiuj estas sub via estreco, kaj tial faru tiamaniere, ke ĉio estu konvena: ke la noktaj ĉapoj estu puraj kaj la malsanuloj ne simulu forĝistojn en la senĝenaj ĉiutagaj vestoj.

Artemij Filippoviĉ. Nu, ĉi tio ne estas ankoraŭ gravaĵo. Ĉapojn, se estas necese, oni povas doni al ili eĉ purajn.

Urbestro. Jes. Kaj ankaŭ super ĉiu lito superskribi latine aŭ en ia alia lingvo... ĉi tio jam apartenas al vi, Ĥristian Ivanoviĉ, — ĉiun malsanon: kiam ĉiu malsaniĝis, kiun tagon kaj daton... Ne bone estas, ke ĉe vi la malsanuloj fumas tian fortan tabakon, ke oni ĉiam ekternas, kiam oni eniras. Kaj cetere estus pli bone, se ilia nombro estus malpli granda: tuj oni povas kulpigi malbonan zorgadon aŭ nelertecon de la kuracisto.

Artemij Filippoviĉ. Ho, pri la kuracado, mi kaj Ĥristian Ivanoviĉ faris decan aranĝon:

ju pli proksime al la naturo, des pli bone, — karajn medikamentojn ni ne uzas. Simpla homo, se li mortos, li ankaŭ sen tio mortos, — se li saniĝos, li ankaŭ sen tio saniĝos. Cetere por Ĥristian Ivanoviĉ eĉ estus malfacile, kompreniĝadi kun ili: li ne scias ruse eĉ unu vorton.

Ĥristian Ivanoviĉ *ellasis sonon, parte similan je la litero „i“, parte je „e“.*

Urbestro. Al vi ankaŭ mi konsilus, Ammos Fjodoroviĉ, meti atenton al la oficaĵoj lokoj. Ĉe vi tie en la antaŭĉambro, kien ordinare venas la petantoj, la gardistoj ennestigis ordinarajn anserojn kun malgrandaj anseridoj, kiuj konstante kuradas sub la piedoj. Certe, aranĝi al si doman mastraĵon, por ĉiu estas afero laŭdinda, kaj kial la gardisto ĝin ne devus aranĝi? Nur, vi scias, en tia loko estas nekonvene... Mi jam antaŭe volis rimarkigi vin pri tio, sed mi ĉiam iel forgesadis.

Ammos Fjodoroviĉ. Nu, mi tuj hodiaŭ ordonos preni ilin ĉiujn en la kuirejon. Se vi volas, venu tagmanĝi.

Urbestro. Krom tio estas malbone, ke ĉe vi ĝuste en la juĝa ĉambro sekiĝas diversaj abomenaĵoj, kaj ĝuste super la ŝranko kun la dokumentoj pendas ĉasa vipo. Mi scias, vi amas ĉason, tamen estas bone, por kelka tempo ien forigi la vipon, — poste, kiam la revizoro forveturos, vi povos, se vi volas, denove ĝin pendigi. Ankaŭ via asesoro... Li sendube estas homo instruita, sed de li iras tiaodoro, kvazaŭ li ĵus eliris el brandfarejo, — tio ĉi ankaŭ estas ne-

bona. Mi volis antaŭ longe tion ĉi diri al vi, sed mi ne memoras jam, kio deturnis mian atenton. Ekzistas kontraŭ tio ĉi rimedo, se ĉi tio efektive, kiel li diras, estas ĉe li odoro natura; oni povas konsili al li manĝi bulbon, aŭ ajlon aŭ ion similan. En tiu ĉi okazo povas helpi per diversaj medikamentoj Ĥristian Ivanoviĉ.

Ĥristian Ivanoviĉ *ellasis supre diritan sonon.*

Ammos Fjodoroviĉ. Ne, tion ĉi oni jam ne povas elpeli: li diras, ke en la infaneco la nutristino lin kontuzis, kaj de tiu tempo de li ĉiam iras iom la odoro de brando.

Urbestro. Nu, mi nur simple rimarkigis al vi. Sed rilate la internan disponadon kaj tion, kion Andrej Ivanoviĉ en la letero nomas peketoj, mi nenion povas diri. Kaj estas eĉ strange paroli: ne ekzistas homo, kiu ne havus iajn pekojn. Tiel aranĝis jam Dio mem, kaj la volteranoj vane kontraŭ tio ĉi parolas.

Ammos Fjodoroviĉ. Kion do vi nomas peketoj, Anton Antonoviĉ? Inter peketoj kaj peketoj estas diferenco. Mi diras al ĉiuj malkaŝe, ke mi prenas subaĉetojn, sed en kia formo mi ilin prenas? En formo de ĉasaj hundidoj. Tio ĉi estas tute alia afero.

Urbestro. Nu, en formo de hundidoj aŭ de io alia, — ĝi ĉiam estas subaĉetoj.

Ammos Fjodoroviĉ. Nu, ne, Anton Antonoviĉ. Sed jen ekzemple, se iu havas pelton por kvincent rubloj kaj la edzino ŝalon...

Urbestro. Nu, kaj kion oni havas de tio, ke vi prenas la subaĉetojn en formo de ĉasaj hundidoj? Se de alia flanko vi ne kredas je Dio; vi neniam iras en la preĝejon: kaj mi, almenaŭ, estas fortika en la religio kaj ĉiun dimanĉon mi estas en la preĝejo. Kaj vi... Ho, mi vin konas: kiam vi komencas paroli pri la kreo de la mondo, simple la haroj stariĝas.

Ammos Fjodoroviĉ. Sed mi ja mem venis al tiuj ideoj, per mia propra saĝo.

Urbestro. Nu, en certaj okazoj multe da saĝo estas pli malbona, ol se oni ĝin tute ne havus. Cetere, mi nur pro okazo ektuŝis la distriktan juĝejon; kaj por diri la veron, mi dubas, ĉu iu tien enrigardos; ĝi estas jam tia enviinda loko, Dio mem ĝin favoras. Sed jen vi, Luka Lukiĉ, vi, kiel inspektoro de lernejoj, devus ekzorgi precipe rilate la instruistojn. Ili, sendube, estas homoj instruitaj kaj ricevis edukon en diversaj kolegioj, sed ili havas tre strangajn manierojn, kiuj kompreneble estas nedisigeblaj de scienca rango. Unu el ili, ekzemple, tiu persono, kiu havas dikan vizaĝon... mi ne memoras lian nomon, neniel povas sin deteni de tio, ke, suririnte sur la katedron, li ne faru grimacon jen tiel (*faras grimacon*), kaj poste li komencas el sub la kravato gladi sian barbon. Kompreneble, se li al lernanto faros tian fizionomion, ĝi ne estas ankoraŭ io grava: eble oni tiel eĉ devas fari, pri tio mi ne povas juĝi; sed vi konsideru mem, se li faros tion ĉi al la vizitanto, — ĝi povas esti tre malbona: sinjoro la

revizoro aŭ iu alia povas rilatigi tion ĉi al si. El tio povas elveni, la diablo scias, kio.

Luka Lukiĉ. Kion do, konsilu, mi povas fari kun li? Mi jam kelkajn fojojn diris al li. Jen ankoraŭ antaŭ kelkaj tagoj, kiam eniris en la klason nia distrikta nobelestro, li aranĝis tian fizionomion, kian mi neniam ankoraŭ vidis. Li certe faris tion ĉi kun plej bonkora intenco, sed mi ricevis mallaŭdon: kial liberpensaj ideoj estas inspirataj al la junularo.

Urbestro. Ankaŭ mi devas rimarkigi vin pri la instruisto en la parto historio. Li estas instruita kapo — tion ĉi oni vidas, kaj da sciencoj li enkaptis senmezuran amasegon, sed li elmetas instruojn kun tia flameco, ke li perdas la kapon. Unu fojon mi lin aŭskultis: nu, dum li parolis pri la Asiroj kaj Babilonanoj, estis ankoraŭ en ordo; sed, kiam li atingis Aleksandron la Macedonan, mi jam ne povas diri al vi, kio kun li fariĝis. Mi pensis, ke brulas, mi ĵuras al vi. Li dekuris de la katedro kaj per siaj tutaj fortoj li ĵetegis la seĝon sur la plankon! Sendube, Aleksandro la Macedona estis heroo, sed por kio rompi seĝojn? Ĝi estas malprofito por la regna kaso.

Luka Lukiĉ. Jes, li estas flamiĝema! Mi jam kelkajn fojojn rimarkigis tion ĉi al li... Li diras: kiel vi volas, por la scienco mi la vivon ne rifuzos oferi.

Urbestro. Jes, tia estas jam la neklarigebla leĝo de la sorto: homo saĝa estas aŭ drinkemulo, aŭ li faras tiajn fizionomiojn, ke oni devas elporti la sanktulojn el la domo.

Luka Lukjĉ. Liberigu nin Dio de servado en la fako sciencia! Ĉion vi devas timi: ĉiu sin enmiksas, ĉiu volas montri, ke li ankaŭ estas saĝa homo.

Urbestro. Tio ĉi ankoraŭ ne estus grava, — sed la malbenita inkognito! Subite li enrigardos: „Ha, jen vi estas, miaj karaj! Kaj kiu — li diros — estas tie ĉi juĝisto?“ — Ljapkin Tjapkin. — „Ĉi tien kun Ljapkin Tjapkin! Kaj kiu estas kuratoro de kadukulejoj?“ — Zemlanika. — „Ĉi tien kun Zemlanika!“ Jen kio estas malbona!

Akto tria

Sceno Va

Policianoj malfermas la ambaŭ duonojn de la pordo. Eniras HLESTAKOV; post li la URBESTRO, poste la KURATORO DE KADUKULEJOJ, INSPEKTORO DE LERNEJOJ, DOBĈINSKIJ, kaj BOBĈINSKIJ, kun plastro sur la nazo. La urbestro montras al la policianoj papereton sur la planko; ili kuras kaj levas ĝin, rapideme puŝante unu alian.

Hlestakov. Bonaj institucioj. Al mi plaĉas, ke ĉe vi oni montras al la traveturantoj ĉion en la urbo. En aliaj urboj oni nenion al mi montris.

Urbestro. En aliaj urboj, mi kuraĝas raporti al vi, la urbestroj kaj oficistoj zorgas pli pri sia propra utilo, por tiel diri; kaj ĉi tie, ni povas diri, ne ekzistas alia celado krom tio, ke per bonordo kaj zorgemeco ni meritu la atenton de la supra estraro.

Hlestakov. La matenmanĝo estis tre bona; mi manĝis satege. Ĉu ĉiutage vi havas tian matenmanĝon?

Urbestro. Intence por tia agrabla gasto.

Hlestakov. Mi amas bone manĝi. Oni ja por tio vivas, ke oni deŝiru por si la florojn de la plezuro. Kia estis la nomo de tiu fiŝo?

Artemij Filippoviĉ, *alkurante*. Laberdano, sinjoro.

Hlestakov. Tre bongusta. Kie do ni matenmanĝis? Ŝajnas al mi, ke en la malsanulejo?

Artemij Filippoviĉ. Tute vere, en la kadukulejo.

Hlestakov. Mi memoras, mi memoras, tie staris litoj. Kaj la malsanuloj saniĝis? Ŝajnas al mi, ke estas tie ne multe da ili.

Artemij Filippoviĉ. Restas ĉirkaŭ dek personoj, ne pli; la ceteraj ĉiuj saniĝis. Estas jam tiel aranĝite, tia ordo. De tiu tempo, kiam mi fariĝis estro, — ĝi eble ŝajnos al vi eĉ nekredebla, — ĉiuj saniĝas kiel muŝoj. Apenaŭ la malsanulo eniris en la malsanulejon, li estas jam sana; kaj ne tiom dank' al medikamentoj, kiom dank' al honesteco kaj ordo.

Urbestro. Kiel ajn kaprompaj estas, mi kuraĝas raporti, la devoj de urbestro! Tiom da diversaj klopodoj sole pri la pureco, riparado, rebonigado... Per unu vorto, la plej saĝa homo estus en granda embaraso, — sed, dank' al Dio, ĉio iras en bona ordo. Alia urbestro, kompreneble, zorgus pri siaj profitoj; sed kredu al mi, eĉ kiam mi kuŝiĝas dormi, mi ĉiam pensas: Dio, mia Sinjoro, kiel aranĝi tiamaniere, ke la estraro vidu mian fervoron kaj estu kontenta?...

Ĉu ĝi rekompencos aŭ ne, — tio ĉi kompreneble dependas de ĝia volo, sed mi almenaŭ estos trankvila en mia koro. Kiam en la urbo ĉio estas en ordo, la stratoj estas balaitaj, la arestitoj estas bone zorgataj, da ebruloj estas malmulte... kion do mi pli bezonas? Per Dio, eĉ honorojn neniam mi volas. Kompreneble, ili estas allogaj, sed en komparo kun virto ĉio estas polvo kaj vantaĵo.

Artemij Filippoviĉ, *al si mem.* Vidu la sentaŭgulon, kiel elokvente li pentras! Donis ja al li Dio tian talenton!

Hlestakov. Ĝi estas vera. Mi konfesas, mi mem amas iafoje filozofii: iafoje per prozo, kaj alian fojon eĉ versetoj elsaltas.

Bobĉinskij, *al Dobĉinskij.* Ĝuste, tute ĝuste, Pjotr Ivanoviĉ! Tiaj rimarkoj... oni vidas, ke li lernis diversajn sciencojn.

Hlestakov. Diru, mi petas, ĉu ne ekzistas ĉe vi iaj amuzoj, societoj, kie oni povus ekzemple iom ludi kartojn?

Urbestro, *al si mem.* Ehe, mi scias, mia kara, kien vi celas! (*Laŭte.*) Dio nin gardu! Tie ĉi oni eĉ ne konas la nomon de tiaj societoj. Mi kartojn neniam prenis eĉ en la manojn; mi eĉ ne scias, kiel oni ludas tiujn kartojn. Mi neniam povis rigardi ilin trankvilanime, kaj se okazas al mi ekvidi ekzemple ian karoan reĝon aŭ ion similan, tiam atakas min tia abomeno, ke mi simple kraĉas. Unu fojon iel okazis, ke amuzante infanojn, mi faris dometojn el karto, — poste la tutan nokton mi sonĝis pri ili, la

malbenitaj. Ni lasu ilin! Kiel estas eble, tiel karan tempon perdi per ili?

Luka Lukiĉ, *al si mem.* Kaj de mi li, malnoblulo, elpoentis hieraŭ cent rublojn.

Urbestro. Mi preferas uzi tiun tempon por utilo de la regno.

Ĥlestakov. Nu, ne, vi tamen senkaŭze... Ĉio dependas de la flanko, de kiu oni rigardas la aferojn. Se vi ekzemple faras ĉeson tiam, kiam oni devas fleksi de tri anguloj... nu, tiam, kompreneble... Ne, ne diru; iafoje estas tre alloge iom ludi.

Sceno VIa

La SAMAJ, ANNA ANDREJEVNA kaj MARJA ANTONOVNA.

Urbestro. Mi kuraĝas prezenti mian familion: mia edzino kaj mia filino.

Ĥlestakov, *salutante.* Kiel feliĉa mi estas, sinjorino, ke mi havas, por tiel diri, plezuron vidi vin.

Anna Andrejevna. Al ni estas ankoraŭ pli agrable, vidi tian personon.

Ĥlestakov, *afekte.* Kion vi diras sinjorino! Tute kontraŭe: a! mi estas ankoraŭ pli agrable.

Anna Andrejevna. Ho, ne! vi afable tion ĉi diras pro komplimento. Mi petas humile volu sidiĝi.

Ĥlestakov. Apud vi stari jam estas feliĉo; cetere, se vi tion ĉi nepre deziras, ni sidiĝos. Kiel mi estas feliĉa, ke mi fine sidas apud vi.

Anna Andrejevna. Ho ne, sinjoro, mi neniel kuraĝas rilatigi al mi... Mi pensas, post la ĉefurbo la vojaĝado aperis al vi tre malagrabla.

Ĥlestakov. Ekstreme malagrabla. Kutimi vivi, *comprenez vous*, en la mondo, kaj subite troviĝi en vojo: malpuraj hoteloj, mallumo de malklereco... Mi konfesas, ke se ne fariĝus tia okazo, kiu min... (*ĵetadas rigardojn al Anna Andrejevna kaj penas plaĉi al ŝi*) tiel rekompencis por ĉio...

Anna Andrejevna. Efektive, kiel malagrabla devas esti al vi.

Ĥlestakov. Cetere, sinjorino, en tiu ĉi minuto estas al mi tre agrable.

Anna Andrejevna. Ne eble! Vi faras al mi multe da honoro. Mi tion ĉi ne meritias.

Ĥlestakov. Kial do vi ne meritias? Vi, sinjorino, meritias.

Anna Andrejevna. Mi loĝas en vilaĝo...

Ĥlestakov. Jes, cetere vilaĝo havas ankaŭ siajn montetojn, riveretojn... Nu, kompreneble, kiu komparos ĝin kun Peterburgo! Ha, Peterburgo! Kia vivo, kredu al mi! Vi eble pensas, ke mi tie nur transskribas paperojn? Ne, la sekciestro estas amika al mi. Ofte li ekfrapas min sur la ŝultron: „Venu, mia kara, al mi tagmanĝi!“ Mi nur por du minutoj eniras en la departementon, nur por diri: tio ĉi devas esti tiel, tio devas esti tiel, kaj tie jam estas oficisto por la skribado, tia rato, tuj komencas per sia plumo „tr... tr...“ kaj skribas kaj skribas.

Oni volis eĉ fari min kolegia asesoro, sed mi diris al mi, por kio mi tion ĉi bezonas? Kaj la pordisto kuras post mi sur la ŝtuparo kun broso: „Permesu, Ivan Aleksandroviĉ, — li diras, — mi al vi purigos la botojn.“ (*Al la urbestro.*) Kial vi, sinjoroj, staras! Mi petas vin, sidiĝu!

Kune. { Urbestro. La rango estas tia, ke
ni povas ankoraŭ stari.
Artemij Filippoviĉ. Ni staros.
Luka Lukiĉ. Ne faru al vi afable
zorgojn!

Hlestakov. Sen ceremonioj, mi petas vin sidiĝu. (*La urbestro kaj ĉiuj sidiĝas.*) Mi ne amas ceremoniojn. Kontraŭe, mi eĉ konstante penas tragliti nerimarkite. Sed mi neniel povas min kaŝi, neniel povas! Apenaŭ mi ien eliras, oni jam diras: „Jen iras Ivan Aleksandroviĉ!“ Kaj unu fojon oni eĉ prenis min por ĉefa militestro: la soldatoj elsaltis el la soldatejo kaj donis al mi honoron per la pafiloj. Poste jam la oficiro, kiu estas mia bona konato, diris al mi: Nu, mia kara, ni tute serioze prenis vin por ĉefa militestro.“

Anna Andrejevna. Kiel interese!

Hlestakov. Mi estas konata kun beletaj aktorinoj. Mi ja ankaŭ verkas diversajn vodeviletojn... Literatorojn mi ofte vidas. Puŝkin estas mia bona amiko. Ofte mi diradis al li: „Nu kio, mia amiko Puŝkin?“ — „Nenio, mia amiko, — li respondadis, — iel tiel ĉio iras...“ Granda originalulo li estas.

Anna Andrejevna. Sekve vi ankaŭ verkas? Kiel agrable kredeble estas al verkisto? Vi certe ankaŭ publikigas en la revuoj?

Hlestakov. Jes, mi ankaŭ en la revuoj publikigas. Ekzistas cetere multe da miaj verkoj: *Edziĝo de Figaro*, *Roberto-Diablo*, *Norma*. Mi eĉ la nomojn jam ne memoras. Kaj ĉio okaze: mi ne volis verki, sed la teatra direkcio diras: „Ni petas vin, amiko, verku ion.“ Kaj mi pensas al mi: „Bone, mi faros al vi la komplezon, mia kara.“ Kaj tuj, ŝajnas al mi, ke en unu vespero, mi ĉion verkis, ĉiujn mirigis. Mi havas eksterordinaran facilecon de pensado. Ĉion, kio estis sub la nomo de barono Brambeus, Fregat Nadeĵda kaj Moskovskij Telegraf ... ĉion tion ĉi mi verkis.

Anna Andrejevna. Kion mi aŭdas! Sekve barono Brambeus estas vi?

Hlestakov. Kompreneble, al ili ĉiuj mi korektas la artikolojn. La eldonisto Smirdin donas al mi por tio ĉi kvardek mil rublojn.

Anna Andrejevna. Certe ankaŭ „Jurij Miloslavskij“ estas via verko?

Hlestakov. Jes, ĝi estas mia verko.

Anna Andrejevna. Mi tuj divenis.

Marja Antonovna. Ha, panjo, tie estas skribite, ke ĝi estas la verko de sinjoro Zagoskin.

Anna Andrejevna. Nu, jen vi havas: mi sciis, ke ankaŭ tie ĉi vi disputos.

Hlestakov. Ha, jes, estas vere: ĝi efektive estas de Zagoskin; sed ekzistas alia „Jurij Miloslavskij“, tiu jam estas mia.

Anna Andrejevna. Nu, certe mi legis la vian, kiel bone skribitan!

Hlestakov. Mi konfesas, mi ekzistas per literaturo. Mia domo estas la unua en Peterburgo. Tiel oni ĝin jam konas: domo de Ivan Aleksandroviĉ. (*Turnas sin al ĉiuj.*) Mi petas vin sinjoroj, se vi estos en Peterburgo, mi petas, mi petas al mi. Mi ja ankaŭ balojn donas.

Anna Andrejevna. Mi pensas, kun kia gusto kaj belegeco oni tie kredeble donas balojn!

Hlestakov. Nu, eĉ ne parolu. Sur la tablo ekzemple vi vidos akvomelonon, — ĝi kostas sepcent rublojn. La supo en la vazo rekte venis per ŝipo el Parizo; kiam oni levas la kovrilon, leviĝas vaporo, similan al kiu oni ne povas trovi en la naturo. Mi estas ĉiutage en baloj. Tie ni jam havas eĉ nian propran kartan kompanion: la ministro de la Aferoj Eksterlandaj, la franca ambasadoro, la ambasadoroj angla kaj germana kaj mi. Kaj ni tiel laciĝas de la ludado, kiel vi ne povas prezenti al vi. Kiam mi suprenkuras sur la ŝtuparo al mi en la kvaran etaĝon, mi diras nur al la kuiristino: „Prenu, Maŭrinjo, la superveston . . .“ Ha, kion mi babilas, — mi tute forgesis, ke mi loĝas en la beletaĝo. Mi havas unu ŝtuparon . . . Kaj interese estas, enrigardi en mian antaŭĉambron, kiam mi ankoraŭ ne vekiĝis: grafoj kaj princoj tie sin puŝas kaj zumas, kiel burdoj, oni nur aŭdas „ĵ . . . ĵ . . . ĵ . . .“ lafoje vi tie trovos ankaŭ ministron . . . (*La urbestro kaj la ceteraj kun timo leviĝas de siaj seĝoj.*) Al mi

oni eĉ en la leteroj skribas: ekscelenco. Unu fojon mi eĉ estis estro de departemento. Strange: la direktoro forveturis, — kien li forveturis, oni ne scias. Nu, kompreneble, oni komencis preparoladi: kion kaj kiel fari, kiu devas okupi la lokon? Multaj el la generaloj havis deziron kaj provis, sed kiam ili aliris pli proksime, — ne: tro malfacile. Laŭ la unua rigardo ĝi ŝajnas eĉ facila, sed kiam oni komencas — ho, la diablo ĝin prenu! Poste ili vidis, ke ili nenion povas fari, — nu, oni devas sin turni al mi. Kaj tuj en la momento en la stratoj ekkuris kurieroj, kurieroj, kurieroj... Vi povas prezenti al vi, sole da kurieroj tridek-kvin miloj! Kia situacio, mi demandas? „Ivan Aleksandroviĉ, iru administri la departementon!“ Mi konfesas, mi iom konfuziĝis, mi eliris en mia nokta robo; mi volis rifuzi, sed mi ekpensis, pri tio ĉi ekscios la regnestro, nu, kaj ankaŭ por mia listo de servado... „Bone, mi diras, mi akceptas la oficon, mi akceptas, — mi diras, — mi konsentas, — mi diras, — mi akceptas, sed memoru, ke ĉe mi ĉio devas esti en plej severa maniero! ĉe mi atentu bone! ĉe mi...“ Kaj efektive: ĉiufoje, kiam mi trairadis tra la departemento — tute kiel tertremo — ĉio tremas, kiel aŭtuna folio.“ (*La urbestro kaj aliaj tremas de timo; Hlestakov flamiĝas pli forte.*) Ho, mi ŝerci ne amas! Mi al ili ĉiuj instruis disciplinon. Min timas eĉ la regna konsilantaro mem. Kaj kion efektive? Mi estas tia! Mi al neniu donas indulgon... mi diras al ĉiuj... Mi mem min konas, mem. Mi estas ĉie, ĉie. Ĉiun tagon mi

veturas en la imperiestran palacon. Tuj morgaŭ oni donos al mi rangon de feldmarŝ... (*ekglitas kaj estas jam falonta sur la plankon, sed la oficistoj kun respekto lin subtenas*).

Urbestro, *alirante kaj tremante per la tuta korpo, penas paroli*. Ha, eks...eks... eksce...

Ĥlestakov, *per rapida abrupta voĉo*. Kio estas?

Urbestro. Ha, eks...eks...eksce...
Via...

Ĥlestakov. Mi nenion komprenas, ĉio estas sensencaĵo.

Urbestro, Eksce...Via...Via...moŝto...princa moŝto, ĉu vi ne bonvolos ripozi?... Jen estas ĉambro kaj ĉio, kio estas necesa.

Ĥlestakov. Ripozi? Sensencaĵo! Bone, mi estas preta ripozi. Via matenmanĝo, sinjoroj, estas bona...mi estas kontenta. (*Deklamante.*) Laberdano! Laberdano! (*Li eniras en la flankan ĉambron, post li la urbestro.*)

Akto kvina

Sceno VIIIa

GASTOJ kaj la POŜTESTRO *enkuras rapidege kun dissigelita letero en la mano*.

Poŝtestro. Mirinda afero, sinjoroj! La oficisto, kiun ni prenis por revizoro, estis ne revizoro.

Ĉiuj. Kiel, ne revizoro?

Poŝtestro. Tute ne revizoro, — mi eksciis tion ĉi el letero.

Urbestro. Kion, kion vi diras? El kiu letero?

Poŝtestro. Nu, el lia propra letero. Oni alportis al mi al la poŝto leteron. Mi ekrigardis la adreson kaj mi vidas: „en la straton Poŝtoŝicejan.“ Mi preskaŭ svenis de konsterniĝo. „Nu, — mi ekpensis en mi, — certe li trovis malordon en la poŝta parto, kaj li nun raportas al la estraro.“ Mi prenis kaj dissigelis.

Urbestro. Kiel do vi...?

Poŝtestro. Mi mem ne scias. Nenatura forto min igis. Jam mi estis vokinta la kurieron, por forsendi la leteron per ekspreso, sed tia scivolo min atakis, kian mi ankoraŭ neniam sentis. Mi ne povas, ne povas, mi sentas, ke mi ne povas! Ĝi tiras min, simple min tiras! En unu orelo mi kvazaŭ aŭdas: „He, ne dissigelu, vi pereos kiel kokino“, kaj en la dua orelo kvazaŭ ia demono murmuris: „Dissigelu, dissigelu, dissigelu!“ Kaj kiam mi ekpemis la sigelvakson — fajro ekkuris tra miaj membroj, kaj kiam mi dissigelis — mi eksentis froston, veran froston. La manoj tremas, kaj ĉio nebuliĝis antaŭ miaj okuloj.

Urbestro. Sed kiel do vi permesis al vi, dissigeli la leteron de tia rajtigita persono.

Poŝtestro. Tio ja estas la tuta afero, ke li ne estas rajtigita kaj li ne estas persono!

Urbestro. Kio do li estas laŭ via opinio?

Poŝtestro. Nek io nek alio; diablo scias, kio!

Urbestro, *flamiĝe*. Kiel nek io nek alio? Kiel vi kuraĝas nomi lin nek io nek alio kaj eĉ ankoraŭ diablo scias kio? Mi vin arestigos...

Poŝtestro. Kiu? vi?

Urbestro. Jes, mi!

Poŝtestro. Por tio ĉi viaj manoj estas tro mallongaj.

Urbestro. Ĉu vi scias, ke li edziĝos kun mia filino, ke mi mem estos grandrangulo, ke mi forsendigos rekte en Siberion?

Poŝtestro. He, Anton Antonoviĉ! Kial paroli pri Siberio? Siberio estas malproksima. Jen, pli bone mi legos al vi, sinjoroj! vi permesas legi la leteron?

Ĉiuj. Legu, legu!

Poŝtestro, *legas*. „Mi rapidas raporti al vi, mia kara Trjapiĉkin, kiaj mirindaĵoj al mi fariĝas. En la vojo tute senmonigis min infanteria kapitano, tiel, ke la hotelmastro volis jam meti min en malliberejon; subite, laŭ mia peterburga fizionomio kaj laŭ miaj vestoj, la tuta urbo prenis min por general-gubernatoro. Kaj mi loĝas nun ĉe la urbestro, ĝuas bonan vivon, amindumas senlime lian edzinon kaj filinon; mi nur ne decidis ankoraŭ, de kiu el ili mi devas komenci, — mi pensas, ke mi komencos de la patrino, ĉar ŝajnas al mi, ke ŝi estas tuj preta por ĉiuj komplezoj. Ĉu vi

memoras, kiel ni kune suferis mizeron, tagmanĝadis per friponaĵoj, kaj kiel unu fojon la sukeraĵisto kaptis min per la kolumo pro la kuketoj, kiujn mi formanĝis je la kalkulo de la enspezoj de la angla reĝo? Nun estas tute alia afero. Ĉiuj donas al mi prunte, kiom mi volas. Teruraj originaloj! Vi mortus de ridado. Mi scias, ke vi skribas iafoje artikoletojn, — enmetu ilin en vian literaturon. Unue: la urbestro — malsaĝa, kiel maljuna ĉevalo...“

Urbestro. Ne povas esti! ĝi tie ne estas!

Poŝtestro, *montras la leteron*. Legu mem.

Urbestro, *legas*. „Kiel maljuna ĉevalo.“
Ne povas esti! Vi mem tion ĉi skribis.

Poŝtestro. Kial do mi skribus?

Artemij Filippoviĉ. Legu!

Luka Lukiĉ. Legu!

Poŝtestro, *legas plue*. „La urbestro — malsaĝa, kiel maljuna ĉevalo...“

Urbestro. Ho! diablo ĝin prenu! Oni devas ankoraŭ ripeti! kvazaŭ ĝi sen tio jam tie ne starus.

Poŝtestro, *legante plue*. Hm ... hm ... hm ... „maljuna ĉevalo. — La poŝtestro estas ankaŭ bona homo...“ (*Ĉesante legi*.) Nu, tie ĉi li ankaŭ pri mi malkonvene sin esprimis.

Urbestro. Ne, legu!

Poŝtestro. Sed por kio do? ...

Urbestro. Ne, diablo ĝin prenu, kiam oni komencis jam legi, tiam oni legu! Legu ĉion!

Artemij Filippoviĉ. Permesu, mi legos. *(Li surmetas okulvitrojn kaj legas.)* „La poŝtestro estas vera portreto de la departementa pordisto Mihejev; kredeble li, kanajlo, ankaŭ drinkas brandon.“

Poŝtestro, *al la rigardantoj.* Nu, sentaŭga bubo, kiun oni devas vergi: nenio plil

Artemij Filippoviĉ, *legante plue.* „La kuratorodekaduku...i...i...i... *(Balbutas.)*

Korobkin. Kial do vi haltis?

Artemij Filippoviĉ. Nu, nelegeble skribite...cetere oni vidas, ke sentaŭgulo.

Korobkin, *legante plue.* „Cetere, ili estas homoj gastamaj kaj bonkoraj. Adiaŭ, mia koro Trjapiĉkin. Mi mem, laŭ via ekzemplo, volas okupi min per literaturo. Enue estas, mia kara, tiel vivi, oni volas fine ian nutraĵon por la animo. Mi vidas, mi devas efektive okupi min per io alta. Skribu al mi en la Saratovan gubernion, kaj de tie en la vilaĝon Podkatilovka.“ *(Li turnas la leteron kaj legas la adreson.)* „Al lia moŝto, sinjoro Ivan Vasiljeviĉ Trjapiĉkin, en Sankt-Peterburgo, strato Poŝtofiĉeja, domo numero naŭdek-sep, en la korto, tria etaĝo, dekstre.“

Unu el la sinjorinoj. Kia skandalo ne-atendita!

Urbestro. Jen, kiam li buĉis, li efektive buĉis! Mi estas mortigita, mortigita, tute mortigita! Nenion mi vidas: mi vidas nur iajn

porkajn buŝegojn anstataŭ vizaĝoj, nenion pli . . .
Revenigu, revenigu lin! (*Svingas la manon.*)

Poŝtestro. Kiel revenigi! Ĝuste al la malfeliĉo oni ordonis al la administranto doni la plej bonan ĉevaltrion; la diablo min puŝis doni ordonojn eĉ por la plua vojo.

Edzino de Korobkin. Jen efektive, jen senekzempla konfuzo!

Ammos Fjodoroviĉ. Tamen, diabloj ĝin prenu, sinjoroj! Li prenis de mi prunte tricent rublojn.

Artemij Filippoviĉ. De mi ankaŭ tricent rublojn.

Poŝtestro, *ĝemas*. Ho! ankaŭ de mi tricent rublojn.

Bobĉinskij. De mi kune kun Pjotr Ivanoviĉ sesdek-kvin per banknotoj, jes, sinjoroj.

Ammos Fjodoroviĉ, *embarase disŝovas la brakojn*. Kiel do, sinjoroj? Kiel do, efektive, ni tiel enfalis?

Urbestro, *batas sin sur la frunton*. Kia maniere mi . . . ne, kiamaniere mi, maljuna malsaĝulo . . .? Mi perdis, malsaĝa ŝafo, mian tutan saĝon! . . . Tridek jarojn mi estas en la servado; neniu komercisto, neniu entreprenisto povis min trompi; friponojn plej friponajn mi trompadis, ruzulojn kaj kanajlojn tiajn, kiuj la tutan mondon povus priŝteli, mi kaptadis sur hokon. Tri guberniestroj mi trompis! . . . Kion mi diras, guberniestroj! (*Svingas la manon.*) Eĉ ne valoras paroli pri guberniestroj . . .

Anna Andrejevna. Sed ĝi ne povas esti, Antoĉjo; li fianĉiĝis kun Manjo...

Urbestro, *kolere*. Fianĉiĝis! Figo kun butero, jen estos al vi fianĉiĝo! Ŝovas sin al mi en la okulojn kun fianĉiĝo!... (*Furioze.*) Jen, rigardu, rigardu, la tuta mondo, la tuta kristanaro, ĉiuj rigardu, kiel azenigita estas la urbestro! Malsaĝulo vi nomu lin, malsaĝulo, la maljunan kanajlon! (*Minacas al si mem per la pugno.*) He, vi, diknazulo! Ŝtopileton, ĉifonon li prenis por grava homo! Jen li nun tra la tuta vojo tintas per sonorileto! Tra la tuta mondo li disportos la historion. Ne sufiĉe, ke vi fariĝos objekto de mokado — troviĝos plumknaristo, paperŝmiristo, kiu eĉ en komedion vin enmetos. Jen tie estas dolora? Li ne indulgos vian rangon nek oficon, kaj ĉiuj nudigos la dentojn kaj aplaudos. Kion vi ridas? Pri vi mem vi ridas! He, vi!... (*De kolero li batas per la piedoj la plankon.*) Mi ĉiujn tiujn paperŝmiristojn... Hu, plumknaristoj, liberaluloj malbenitaj! Semo de la diablo! Mi ligus vin ĉiujn en unu pakon, mi frotus vin ĉiujn al faruno, kaj al la diablo mi donus vin ĉiujn por subŝtofo! En lian ĉapon mi ŝutus vin, tien!... (*Li skuas la pugnon kaj batas per la kalkanumo la plankon.*)... (*Post kelka silento.*) Ĝis nun mi ne povas reveni al normala stato. Jen, efektive, se Dio volas iun puni, li antaŭe forprenas de li la saĝon. Nu, kio en tiu ventkapulo estis simila al revizoro? Nenio estis! Nenio estis simple eĉ duonfingro da simileco — kaj subite ĉiuj ekkriis: revizoro! revizoro!

Nu, kiu la unua ektrumpetis, ke li estas revizoro? Respondu!

Artemij Filippoviĉ, *dispuŝante la brakojn*. Kiel ĝi fariĝis — eĉ se vi mortigos min, mi ne povus klarigi. Kvazaŭ ia nebulo atakis, diablo konfuzis.

Ammos Fjodoroviĉ. Kiu eltrumpetis? Jen, kiu eltrumpetis: tiuj ĉi bravuloj! (*Montras Dobĉinskij-n kaj Bobĉinskij-n.*)

Bobĉinskij. Per Dio, ne mi! mi eĉ ne intencis...

Dobĉinskij. Mi nenion, tute nenion...

Artemij Filippoviĉ. Kompreneble, vi.

Luka Lukiĉ. Sendube. Ili alkuris el la hotelo kiel frenezuloj: „Li alveturis, li alveturis, kaj monon li ne pagas...“ Ili trovis gravan birdon!

Urbestro. Kompreneble, vi! ĉikanistoj de la urbo, mensogistoj malbenitaj!

Artemij Filippoviĉ. Diablo vin prenu kun via revizoro kaj kun viaj rakontoj.

Urbestro. Vi nur kuradas tra la urbo kaj konfuzas ĉiujn, vi, krakiloj malbenitaj. Malverajn famojn vi semas, pigoj mallongvostaj!

Ammos Fjodoroviĉ. Ŝmiristoj malbenitaj!

Luka Lukiĉ. Noktoĉapoj!

Artemij Filippoviĉ. Nazofluuloj mallongventraj! (*Ĉiuj ĉirkaŭas ilin.*)

Bobĉinskij. Per Dio, ĝi ne estis mi, ĝi estis Pjotr Ivanoviĉ.

Dobĉinskij. He, ne, Pjotr Ivanoviĉ, vi ja la unua tion...

Bobĉinskij. Nu, ne; la unua estis vi.

Lasta Sceno

La SAMAJ kaj ĜENDARMO.

Ĝendarmo. Oficisto el Peterburgo, kiu alveturis laŭ imperiestra ordono, postulas, ke vi tuj venu al li. Li enloĝiĝis en la hotelo. *(La elparolitaj vortoj frapas ĉiujn kiel tondro. Sono de surpriziĝo elfugas ĥore el la buŝoj de la sinjorinoj; la tuta grupo, subite ŝanĝinte la situacion, restas kvazaŭ ŝtonigita.)*

Georgo Dandin

PERSONOJ:

GEORGO DANDIN (Dandèn), riĉa kampulo, edzo de Angeliko.

ANGELIKO, edzino de Georgo Dandin kaj filino de S-ro de Sotenville.

S-ro de SOTENVILLE (Sotanvil), kampara nobelo, patro de Angeliko.

S-ino de SOTENVILLE.

KLITANDRO, amanto de Angeliko.

KLAŬDINO, servantino de Angeliko.

LUBIN (Lübèn), kampulo, servanto de Klitandro.

COLIN (Kolèn), servisto de Georgo Dandin.

La loko de agado estas antaŭ la domo de Georgo Dandin, en la kamparo.

Akto unua

Sceno unua

GEORGO DANDIN, *sola*.

Ha, nobela edzino estas malbona afero! Kaj mia edziĝo estas instrua leciono por ĉiuj kampuloj, kiuj volas leviĝi super sian staton kaj edzoliĝi kun domo de nobelo, kiel mi faris! La nobeleco per si mem estas bona; ĝi estas io valora, tute certe; sed ĝi estas ligita kun tiom da malbonaj cirkonstancoj, ke estas

tre bone, lasi ĝin flanke. Pri tio mi fariĝis saĝa per mia propra kostopago, kaj mi scias, kiel nin traktas la nobeloj, kiam ili nin nobelojn akceptas en sian familion. La ligo, kiun ili faras, estas tre malgranda rilate nian personon; sole kun nia havo ili edziĝas; kaj kiel ajn riĉa mi estas, mi farus pli bone, se mi edziĝus kun senartifika kaj bona kampulino, anstataŭ preni edzinon, kiu tenas sin pli alte ol mi, vidas ofendon por si en tio, ke ŝi portas mian nomon, kaj pensas, ke per mia tuta riĉeco mi ne sufiĉe pagis por la honoro esti ŝia edzo. Georgo Dandin, Georgo Dandin! vi faris mal-saĝaĵon la plej grandan en la mondo. Mia domo estas nun por mi io terura, kaj ĉiufoje, kiam mi eniras en ĝin, mi nepre trovas tie ian ĉagrenon.

Sceno dua

GEORGO DANDIN, LUBIN.

Georgo Dandin, *al si mem, vidante, ke Lubin eliras el lia domo.* Kion, al la diablo, tiu sentaŭgulo faris ĉe mi?

Lubin, *al si mem, rimarkante Georgon Dandin.* Jen ia homo min observas!

Georgo Dandin, *al si mem.* Li min ne konas.

Lubin, *al si mem.* Li ion suspektas.

Georgo Dandin, *al si mem.* Ha, li forte sin ĝenas saluti.

Lubin, *al si mem.* Mi timas, ke li rakontu al iu, ke li vidis min eliranta el tie.

Georgo Dandin. Bonan tagon!

Lubin. Via servanto!

Georgo Dandin. Vi ne estas de ĉi tie,
al mi ŝajnas?

Lubin. Ne, mi venis ĉi tien nur por vidi
la morgaŭan feston.

Georgo Dandin. Efektive? diru, mi
petas, vi venas de tie el la domo?

Lubin. Ts!

Georgo Dandin. Kio?

Lubin. Silentu!

Georgo Dandin. Kio do estas?

Lubin. He, nu! Vi ne devas diri, ke vi
vidis min eliranta el tie.

Georgo Dandin. Kial?

Lubin. Mia Dio! ĉar...

Georgo Dandin. Kial do?

Lubin. Mallaŭte! mi timas, ke oni nin
aŭskultas.

Georgo Dandin. Tute ne, tute ne!

Lubin. Mi ĵus parolis kun la mastrino de
la loĝejo, en komisio de unu sinjoro, kiu faras
al ŝi amajn okuletojn; kaj estas necese, ke oni
tion ne sciu. Vi komprenas?

Georgo Dandin. Jes.

Lubin. Tio estas la kaŭzo. Oni severe
ordonis al mi, ke mi min gardu, ke neniu min
vidu; tial mi petas vin, ne diru, ke vi min vidis.

Georgo Dandin. Mi min gardos.

Lubin. Mi tre volas fari la aferojn sekrete, kiel oni rekomendis al mi.

Georgo Dandin. Tre prave.

Lubin. La edzo, kiel oni diras, estas ĵaluzulo, kiu ne volas, ke oni ludu amon kun lia edzino, kaj li diable furiozus, se io simila venus al liaj oreloj. Vi komprenas?

Georgo Dandin. Tre bone.

Lubin. Estas necese, ke li nenion sciu pri tio.

Georgo Dandin. Sendube.

Lubin. Oni volas trompi lin tute silente. Vi komprenas?

Georgo Dandin. Plej perfekte.

Lubin. Se vi dirus, ke vi vidis min eliranta el lia domo, vi malbonigus la tutan aferon. Vi komprenas?

Georgo Dandin. Certe! Kaj kia estas la nomo de tiu, kiu vin sendis tien?

Lubin. Ĝi estas la sinjoro de nia loko, sinjoro vicgrafo de...

Pesto! mi neniam memoras, kiel, al la diablo, oni elparolaĉas tiun nomon; sinjoro Kli... Klitandro.

Georgo Dandin. Ĉu ĝi estas tiu juna kortegano, kiu loĝas...

Lubin. Jes, apud tiuj arboj.

Georgo Dandin, *al si mem.* Ha, tio estas la kaŭzo, ke antaŭ ne longe tiu sinjoreto prenis loĝejon kontraŭe de mi! Videble mi havis bonan nazon, kaj lia najbareco tuj estis por mi suspekta.

Lubin. Vorton de honoro! li estas la plej honesta homo, kiun oni iam vidis. Li donis al mi tri orajn monerojn, por ke mi nur iru diri al la virino, ke li ŝin amas, kaj ke li tre dezirus havi la honoron paroli kun ŝi. Nu, diru, ĉu ĝi estas granda laboro, por ke li devu pagi al mi tiel bone? Kaj kio estas, en komparo kun tio, tuta tago da laborado, kiu donas al mi ne pli ol dek soldojn!

Georgo Dandin. Nu, ĉu vi plenumis vian komision?

Lubin. Jes; mi trovis tie iun Klaŭdinon, kiu tuj en la unua momento komprenis, kion mi volas, kaj enkondukis min al sia mastrino.

Georgo Dandin, *al si mem.* Ha, fripona servantino!

Lubin. Al la diablo! Tiu Klaŭdino estas tute bela; ŝi akiris mian amon, kaj ĝi nur dependos de ŝi, ke ni fariĝu geedzoj.

Georgo Dandin. Sed kian respondon donis la mastrino al tiu sinjoro kortegulo?

Lubin. Ŝi ordonis, ke mi diru al li... Atendu, mi ne scias, ĉu mi bone memoras ĉion ĉi tion... Ŝi diris, ke ŝi estas al li tre danka por la amo, kiun li havas por ŝi; sed pro ŝia edzo, kiu estas stranga homo, li sin gardu, ke oni tion ne rimarku; kaj ke oni devos peni trovi ian rimedon, ke ili povu ambaŭ paroli inter si.

Georgo Dandin, *al si mem.* Ha, pendiginda virino!

Lubin. Al la diablo! Estos tre amuze, ĉar la edzo eĉ ne suspektos la sekretaĵojn, tio

estas la plej bona: kaj li havos longan nazon kun sia ĵaluzeco. Ne vere?

Georgo Dandin. Certe vere.

Lubin. Adiaŭ! Tenu la buŝon fermita. Konservu bone la sekreton, ke la edzo nenion sciu.

Georgo Dandin. Jes, jes.

Lubin. Kio min koncernas, mi ŝajnigos, ke mi nenion scias. Mi estas granda ruzulo, kaj neniu povos diri, ke mi havas ian rilaton al la afero.

Sceno tria

GEORGO DANDIN, *sola*.

Nu, Georgo Dandin, vi vidas, en kia maniero via edzino kun vi agas! Jen kio venas, se oni volis edziĝi kun fraŭlino! Oni ĉirkaŭbatas vin de ĉiuj flankoj, kaj vi eĉ ne povas venĝi, kaj la nobeleco ligas al vi la manojn. Egaleco de la statoj lasas almenaŭ al la honoro de edzo la liberecon montri siajn sentojn; kaj se ĝi estus kampulino, vi estus nun tute libera, fari al vi justecon per bona porcio da bastonbatoj. Sed vi volis gustumi nobelecon, kaj tedis vin esti mastro en via domo. Ha, mi furiozas el mia tuta koro, kaj mi volonte donus al mi vango-frapojn. Kio! senhonte aŭskulti la amesprimon de sinjoreto kaj al tio promesi ankoraŭ interkomunikiĝon! La diablo ĝin prenu! Tiaspecan okazon mi ne volas preterlasi. Kiel mi nun staras, mi devas tuj iri plendi al la patro kaj al la patrino kaj fari ilin atestantoj de la ĉagrenoj kaj malhonoro, kiun ilia filino al mi kaŭzas. Sed jen ili ambaŭ venas, tre ĝustatempe.

Sceno kvara

S-ro DE SOTENVILLE, S-ino DE SOTENVILLE,
GEORGO DANDIN.

S-ro de Sotenville. Kio estas, mia bofilo? Ŝajnas al mi, ke vi estas tre ekscitita.

Georgo Dandin. Kaj mi havas kaŭzon por tio, kaj...

S-ino de Sotenville. Mia Dio! Kiel malmulte da ĝentileco vi havas, ke vi ne salutas la homojn, kiam vi aliras al ili!

Georgo Dandin. Kredu al mi, mia bopatrino, mi havas aliajn aferojn en la kapo; kaj...

S-ino de Sotenville. Denove! Ĉu estas eble, nia bofilo, ke vi tiel malmulte konas la mondajn postulojn, kaj oni ne povas lernigi al vi la manieron, en kiu oni devas vivi inter personoj de bona deveno?

Georgo Dandin. Kial?

S-ino de Sotenville. Ĉu vi neniam en rilato al mi formetos la familiarecon de tiu vorto „bopatrino“? kaj ĉu vi ne povus al kutimiĝi diri al mi „sinjorino“?

Georgo Dandin. Al ĉiuj patronoj! Se vi min nomas via bofilo, ŝajnas al mi, ke mi povas vin nomi mia bopatrino!

S-ino de Sotenville. Oni forte povus ion diri kontraŭ tio, kaj la aferoj ne estas egalaj. Sciu do, mi petas, ke ne por vi ĝi estas konvena, uzi tiun vorton kun persono de mia situacio; ke, kvankam vi eĉ estas nia bofilo, estas granda diferenco inter vi kaj ni, kaj vi devas koni vin mem.

S-ro de Sotenville. Sufiĉe pri tio, mia amata; ni lasu ĝin.

S-ino de Sotenville. Mia Dio! sinjoro de Sotenville, vi havas ian apartan malseverecon, kaj vi ne scias devigi la homojn doni al vi tion, kio al vi decas.

S-ro de Sotenville. Al la diablo! Pardonu, pri tio oni ne povas fari al mi lecionojn, kaj en la daŭro de mia vivo mi per dudek bravaj agoj montris, ke mi ne estas homo, kiu lasus defali eĉ unu colon de siaj pretendoj; sed nun sufiĉas, ke ni donis al li negrandan averton. Nun ni iom aŭdu, mia bofilo, kion vi havas en via kapo.

Georgo Dandin. Ĉar mi devas paroli kategorie, mi diros al vi, sinjoro de Sotenville, ke mi havas kaŭzon...

S-ro de Sotenville. Kviete, mia bofilo! Sciu, ke ne estas respektite, paroli al homoj per ilia nomo, kaj ke al tiuj, kiuj staras pli alte ol ni, oni devas diri simple „sinjoro“.

Georgo Dandin. Nu, bone, simple sinjoro, kaj ne plu sinjoro de Sotenville, mi devas diri al vi, ke mia edzino...

S-ro de Sotenville. Haltu; sciu ankaŭ, ke vi ne devas diri „mia edzino“, kiam vi parolas pri nia filino.

Georgo Dandin. Mi povas fariĝi furioza! Kiel! Mia edzino ne estas mia edzino?

S-ino de Sotenville. Jes, nia bofilo, ŝi estas via edzino; sed vi ne devas permesi al vi, nomi ŝin tiel; vi povus tion fari, se vi estus edzigitita kun persono de via klaso.

Georgo Dandin, *al si mem.* Ha, Georgo Dandin, kien vi enŝoviĝis! (*Laŭte.*) He, mi vin petas, lasu por momento flanke vian nobelecon kaj permesu, ke mi parolu al vi, kiel mi povas. (*Al si mem.*) La diablo prenu ĉiujn ĉi malbenitajn ceremoniojn! (*Al S-ro de Sotenville.*) Mi diras do al vi, ke mi estas malkontenta pri mia edziĝo.

S-ro de Sotenville. Kaj lakaŭzo, mia bofilo?

S-ino de Sotenville. Kio! Paroli tiamaniere pri afero, el kiu vi eltiris tiajn grandajn profitojn!

Georgo Dandin. Kaj kiajn profitojn, sinjorino, se sinjorino nepre volas sin enmiksi? La historio estis ne malbona por vi, ĉar sen mi viaj aferoj — volu min pardoni — estis tre kadukaj, kaj mia mono servis por ŝtopi tre rimarkeblajn truojn; sed mi, kion mi profitis, mi vin petas? nur plilongigon de mia nomo, ĉar anstataŭ „Georgo Dandin“ mi ricevis de vi la titolon „sinjoro de la Dandinière“.

S-ro de Sotenville. Ĉu vi kalkulas kiel nenion, mia bofilo, la honoron, ke vi parenciĝis kun la domo de Sotenville?

S-ino de Sotenville. Kaj kun la domo de la Prudoterie, el kiu mi havas la honoron deveni; domo, en kiu ankaŭ la virina linio nobeligas, kaj kiu, dank' al tiu bela privilegio, faros viajn infanojn nobeloj?

Georgo Dandin. Jes, tre bone, miaj infanoj estos nobeloj, sed mi estos trompita koko, se oni ne faros ordon.

S-ro de Sotenville. Kion vi volas diri, mia bofilo?

Georgo Dandin. Mi volas diri, ke via filino ne kondutas tiel, kiel edzino devas konduti, kaj ke ŝi faras aferojn, kiuj estas kontraŭaj al la honoro.

S-ino de Sotenville. Haltu; gardu vin pri tio, kion vi parolas. Mia filino devenas de gento, kiu estas tro plena de virto, por fari iam ian aferon, de kiu la honesteco povus esti difektita; kaj koncerne la domon de la Prudoterie, oni dank' al Dio de tricent jaroj tie ne vidis virinon, kiu donus kaŭzon, ke oni parolu pri ŝi.

S-ro de Sotenville. Al la diablo! En la domo de Sotenville oni neniam vidis koketulinon; kaj la ĉasteco ĉe la virinoj tie estas ne malpli hereda, ol la kuraĝeco ĉe la viroj.

S-ino de Sotenville. Ni havis iun Jakelinon de la Prudoterie, kiu ne volis esti amdonantino de duko kaj regna konsilisto, reganto de nia provinco.

S-ro de Sotenville. Ekzistus iu Maturino de Sotenville, kiu rifuzis akcepti dudek mil talerojn de reĝa favorato, kiu volis havi nur la privilegion libere paroli kun ŝi.

Georgo Dandin. Nu, via filino ne estas tiel obstina, kaj ŝi fariĝis malpli sovaĝa de la tempo, kiam ŝi estas ĉe mi.

S-ro de Sotenville. Parolu pli klare, mia bofilo. Ni ne estas tiaj homoj, kiuj protektus ŝin en malbonaj faroj, kaj ni la unuaj, ŝia patrino kaj mi, estas pretaj, doni al vi justecon pri tio.

S-ino de Sotenville. Ni komprenas neniajn ŝercojn en aferoj, kiuj koncernas honoron, kaj ni edukis ŝin en la plej granda severeco.

Georgo Dandin. Ĉio, kion mi povas diri al vi, estas, ke troviĝas ĉi tie iu kortegulo, kiun vi vidis, kiu montras al ŝi amon antaŭ mia nazo, kaj kiu faris al ŝi pri sia amo certigan klarigon, kiun ŝi aŭskultis tre homame.

S-ino de Sotenville. Granda Dio! Mi ŝin sufokus per miaj propraj manoj, se montriĝus, ke ŝi dekliniĝis de la honesteco de sia patrino.

S-ro de Sotenville. Al la diablo! Mi trapikus per mia spado ŝin kaj ŝian amanton, se ŝi pekus kontraŭ sia honoro.

Georgo Dandin. Mi rakontis al vi la fakton, por prezenti al vi miajn plendojn; kaj mi postulas de vi kontentigon pri tiu afero.

S-ro de Sotenville. Estu tute trankvila, mi donos al vi kontentigon de la flanko de ili ambaŭ; al kiu ajn oni devas meti la pugnon sur la bruston, mi taŭgas por tio. Sed ĉu vi estas tute certa pri tio, kion vi diras al mi?

Georgo Dandin. Tute certa.

S-ro de Sotenville. Gardu vin bone; ĉar inter nobeloj tio ĉi estas tiklaj aferoj, kaj estas danĝere, se oni faras en tio ian maltrafon.

Georgo Dandin. Mi diris al vi nenion, kio estus malvera.

S-ro de Sotenville. Mia koro, iru paroli kun via filino, dum mi kun mia bofilo iros paroli kun la viro.

S-ino de Sotenville. Ĉu ĝi estas ebla, mia filo, ke ŝi sin tiom forgesus, post la virta ekzemplo, kiun, kiel vi mem scias, mi donis al ŝi!

S-ro de Sotenville. Ni klarigos la aferon. Sekvu min, mia bofilo, kaj zorgu pri nenio. Vi vidos, per kia ligno ni nin hejtas, kiam oni faras atencon pri tiuj, kiuj apartenas al ni.

Georgo Dandin. Jen li mem venas al ni renkonte.

Sceno kvina

S-ro DE SOTENVILLE, KLITANDRO, GEORGO DANDIN.

S-ro de Sotenville. Sinjoro, ĉu vi min konas?

Klitandro. Kiom mi scias, ... ne.

S-ro de Sotenville. Mia nomo estas barono de Sotenville.

Klitandro. Mi tre ĝojas.

S-ro de Sotenville. Mia nomo estas konata ĉe la kortego; kaj en mia juneco mi havis la honoron, esti el la unuaj, kiuj distingigis ĉe la nobelara armiĝo en Nancy.

Klitandro. Mi gratulas.

S-ro de Sotenville. Sinjoro mia patro, Jean-Gilles de Sotenville, havis la gloron, partopreni persone en la granda sieĝo de Montauban.

Klitandro. Mi estas ravita.

S-ro de Sotenville. Mi havis praavon, Bertrandon de Sotenville, kiu estis tiel eminenta

en sia tempo, ke li ricevis la permeson, vendi sian tutan bienon, por veturi trans la maron.

Klitandro. Mi volonte kredas.

S-ro de Sotenville. Oni raportis al mi, sinjoro, ke vi amas kaj persekutas iun junan personon, kiu estas mia filino, kaj pri kiu mi interesiĝas tiel same, kiel pri la homo, kiun vi vidas (*montrante al Georgo Dandin*), kaj kiu havas la honoron esti mia bofilo.

Klitandro. Kiu? mi?

S-ro de Sotenville. Jes; kaj estas al mi tre agrable, paroli kun vi, por ricevi de vi, mi petas, klarigon pri tiu afero.

Klitandro. Ĝi estas stranga kalumnio! Kiu tion diris al vi?

S-ro de Sotenville. Iu, kiu pensas, ke li bone tion scias.

Klitandro. Tiu iu mensogis. Mi estas honesta homo. Ĉu vi opinias min kapabla, sinjoro, por tia malnobla agado? Mi amindumus junan kaj belan personon, kiu havas la honoron esti la filino de sinjoro barono de Sotenville! Mi tro multe vin respektas kaj tro multe estas preta vin servi, por ke mi faru ion similan. Kiu ajn tion diris al vi, estas malsaĝulo.

S-ro de Sotenville. Nu, mia bofilo?

Georgo Dandin. Kio?

Klitandro. Estas fripono kaj sentaŭgulo.

S-ro de Sotenville, *al Georgo Dandin*.
Respondu!

Georgo Dandin. Respondu vi mem!

Klitandro. Se mi scius, kiu li povas esti, mi enpuŝus al li, en via alesto, la spadon en la ventron.

S-ro de Sotenville, *al Georgo Dandin*. Pruvu do la aferon.

Georgo Dandin. Ĝi estas tute pruvita. Ĝi estas vero.

Klitandro. Ĉu ĝi estas via bofilo, sinjoro, kiu...?

S-ro de Sotenville. Jes, li estas ĝuste tiu, kiu plendis al mi pri tio.

Klitandro. Certe, ĝi estas lia feliĉo, ke li havas la honoron, aparteni al vi; alie mi bone instruus lin, fari tiajn parolojn pri persono kiel mi.

Sceno sesa

S-ro DE SOTENVILLE, S-ino DE SOTENVILLE, ANGELIKO, KLITANDRO, GEORGO DANDIN, KLAUDINO.

S-ino de Sotenville. Koncerne tion mi devas diri, ke la ĵaluzo estas efektive stranga afero. Mi alkondukas ĉi tien mian filinon, por klarigi la aferon en ĉies alesto.

Klitandro, *al Angeliko*. Ĉu ĝi estas vi, sinjorino, kiu diris al via edzo, ke mi vin amas?

Angeliko. Mi? Kiel mi povus tion diri al li? Ĉu ĝi estas vero? Mi volus efektive vidi, ke vi provus min ami! Provu ĝin, mi vin petas; vi vidus, kun kiu vi parolas! Mi konsilas al vi tion fari. Uzu ĉiujn artifikojn de amantoj; provu iam, por plezuro, sendi al mi sendatojn, skribi al mi sekrete amajn leteretojn.

serĉi la momentojn, kiam mia edzo ne estas hejme, aŭ kiam mi eliras, kaj parolu al mi pri via amo: vi bezonas nur veni, mi promesas al vi, ke vi estos dece akceptata.

Klitandro. Nu, nu, sinjorino, kviete! Ne estas necese, fari al mi tiom da lecionoj kaj tiom skandaliĝi. Kiu diris al vi, ke mi havas la ideon vin ami?

Angeliko. Kiel mi povas scii, kion oni ĉi tie rakontis?

Klitandro. Oni rakontu, kion oni volas; sed vi ja scias, ĉu mi parolis kun vi pri amo, kiam mi vin renkontis.

Angeliko. Vi devus nur tion fari, vi havus bonan akcepton!

Klitandro. Mi certigas vin, ke kun mi vi devas nenion timi: mi ne estas tia homo, kiu faras ĉagrenon al belulinoj; kaj mi vin tro respektas, vin kaj viajn estimatajn gepatrojn, por ke mi havu la penson, enamiĝi en vin.

S-ino de Sotenville, *al Georgo Dandin*. Nu, vi vidas?

S-ro de Sotenville. Jen vi estas kontentigita, mia bofilo. Kion vi diros al tio?

Georgo Dandin. Mi diros, ke tio estas fabeloj por enluligi; ke mi bone scias, kion mi scias, kaj ke, ĉar mi jam devas paroli klare, ŝi ĵus akceptis komisiulon de li.

Angeliko. Mi? mi akceptis komisiulon?

Klitandro. Mi sendis komisiulon?

Angeliko. Klaŭdino!

Klitandro, *al Klaŭdino*. Ĉu estas vere?

Klaŭdino. Mian vorton de honoro, ĝi estas stranga malveraĵo!

Georgo Dandin. Silentu, vi malĉastulino. Mi bone vin konas. Ĝi estas vi, kiu ĵus enkondukis la komisiulon.

Klaŭdino. Kiu? mi?

Georgo Dandin. Jes, vi. Ne ludu rolon de purulino.

Klaŭdino. Ho ve, kiel la mondo nun estas plena de malboneco! tiel min suspekti, min, kiu estas la senkulpeco mem!

Georgo Dandin. Silentu, virinaĉo! vi ludas la rolon de modestulino, sed mi konas vin jam de longe, vi estas ruza kanajlo.

Klaŭdino, *al Angeliko*. Sinjorino, ĉu...

Georgo Dandin. Silentu, mi diras al vi! alie vi povus tre kare pagi por ĉiuj, ĉar vi ja ne havas patron nobelan.

Angeliko. Ĝi estas kalumnio tiel granda, kaj kiu tiel forte vundas mian koron, ke mi ne povas eĉ havi la forton por respondi. Ĝi estas ja io terura, esti akuzata de edzo, kiam oni faris al li nenion, kio estas ne farinda! Ho ve, se mi meritas ian riproĉon, ĝi estas nur tio, ke mi agis kun li tro bone.

Klaŭdino. Certe.

Angeliko. Mia tuta malfeliĉo estas tio, ke mi tro zorgas pri li; la ĉielo volu, ke mi estu kapabla toleri, kiel li diras, ies amindumaĵojn! mi ne estus tiam tiel plendinda. Adiaŭ, mi foriras; mi ne povas plu toleri, ke oni min tiamaniere ofendu.

Sceno sepa

S-ino DE SOTENVILLE, S-ro DE SOTENVILLE,
KLITANDRO, GEORGO DANDIN, KLAŬDINO.

S-ino de Sotenville, *al Georgo Dandin.*
Iru, vi ne meritas la honestan edzinon, kiun
oni donis al vi.

Klaŭdino. Vorton de honoro, li meritus,
ke ŝi verigu tion, kion li diris; kaj, se mi estus
en ŝia loko, mi ne longe marĉandus. (*Al Klit-*
andro.) Jes, sinjoro, vi devus nun, per lin puni,
amindumi mian mastrinon. Komencu kuraĝe,
mi tion diras al vi, ĝi estos tre ĝustatempa; kaj
mi proponas al vi, ke mi vin helpos, ĉar li ja
tiamaniere min jam taksas. (*Klaŭdino foriras.*)

S-ro de Sotenville. Vi meritas, mia
bofilo, ke oni diru al vi tiajn aferojn; via agado
indignigas ĉiujn kontraŭ vi.

S-ino de Sotenville. Iru, penu agi pli
bone kun fraŭlino altedevena; kaj gardu vin de
nun, ke vi plu ne faru tiajn eraregojn.

Georgo Dandin, *al si mem.* Mi estas
tute furioza, ke mi staras kiel malpravulo, dum
mi estas prava.

Sceno oka

S-ro DE SOTENVILLE, KLITANDRO, GEORGO
DANDIN.

Klitandro, *al S-ro de Sotenville.* Sinjoro,
vi vidas, kiel false mi estis akuzita: vi estas
homo, kiu scias la principojn de honoro, kaj
mi postulas de vi kontentigon por la honto,
kiu estas farita al mi.

S-ro de Sotenville. Tio estas tute justa kaj tute laŭ la ordo. Nu, mia bofilo, donu kontentigon al la sinjoro.

Georgo Dandin. Kio? kontentigon?

S-ro de Sotenville. Jes, la ordo tion postulas, ĉar vi malprave lin akuzis.

Georgo Dandin. Sed tio ja estas la afero, ke mi tute ne konsentas, ke mi lin malprave akuzis; kaj mi bone scias, kion mi pri tio pensas.

S-ro de Sotenville. Tio ne estas grava. Kia ajn penso povus resti ĉe vi, li neis, kaj tio devas sufiĉi; kaj oni ne havas rajton, plendi pri iu, se li neas kulpecon.

Georgo Dandin. Sekve, se mi lin trovus kuŝanta kun mia edzino, li devus nur nei, kaj tio lin jam senkulpigus?

S-ro de Sotenville. Ne rezonadu. Petu lin pri pardono, kiel mi diras al vi.

Georgo Dandin. Mi! Mi devas ankoraŭ peti lin pri pardono, post tio, ke...

S-ro de Sotenville. Rapide, mi diras al vi, vi havas nenion por pripensi; kaj vi ne devas timi, ke vi faras tro multe, ĉar mi mem ja tion konsilas al vi.

Georgo Dandin. Mi ne povas...

S-ro de Sotenville. Al la diablo! mia bofilo, ne incitu al mi la galon, ĉar mi kuniĝus kun li kontraŭ vi. Nu, lasu, ke mi vin gvidu.

Georgo Dandin, *al si mem.* Ha, Georgo Dandin!

S-ro de Sotenville. Antaŭ ĉio prenu vian ĉapon en la manon: la sinjoro estas nobelo, kaj vi ne estas tia.

Georgo Dandin, *al si mem, tenante la ĉapon en la mano.* Mi krevas de furiozo!

S-ro de Sotenville. Ripetu post mi: Sinjoro...

Georgo Dandin. Sinjoro...

S-ro de Sotenville. Mi petas vian pardonon... (*Vidante, ke Georgo Dandin penas ne obei lin.*) Ha!

Georgo Dandin. Mi petas vian pardonon...

S-ro de Sotenville. Pri la malbonaj pensoj, kiujn mi havis rilate vin...

Georgo Dandin. Pri la malbonaj pensoj, kiujn mi havis rilate vin.

S-ro de Sotenville. Ĝi estis kaŭzita de tio, ke mi ne havis la honoron, vin koni...

Georgo Dandin. Ĝi estis kaŭzita de tio, ke mi ne havis la honoron vin koni...

S-ro de Sotenville. Kaj mi petas vin kredi...

Georgo Dandin. Kaj mi petas vin kredi...

S-ro de Sotenville. Ke mi estas via servanto.

Georgo Dandin. Vi volas, ke mi estu servanto de homo, kiu volas fari min trompita koko?

S-ro de Sotenville, *farante al li signon de minaco.* Ha!

Klitandro. Sufiças, sinjoro.

S-ro de Sotenville. Ne, mi volas, ke li finu, kaj ke ĉio estu farata laŭforme . . . Ke mi estas via servanto.

Georgo Dandin. Ke mi estas via servanto.

Klitandro, *al Georgo Dandin*. Sinjoro, mi estas tutkore via, kaj mi plu ne pensas pri tio, kio okazis. (*Al S-ro de Sotenville.*) Al vi, sinjoro, mi diras adiaŭ, kaj mi bedaŭras la malgrandan ĉagrenon, kiun vi havis.

S-ro de Sotenville. Mi kisas al vi la manojn; kaj se ĝi plaĉos al vi, mi liveros al vi la amuziĝon, ĉasi kun mi leporon.

Klitandro. Vi estas tro bona kontraŭ mi. (*Klitandro foriras.*)

S-ro de Sotenville. Jen, mia bofilo, kiel oni devas konduki la aferojn! Adiaŭ. Sciu, ke vi eniris en familion, kiu donos al vi apogon kaj neniam toleros, ke oni faru al vi ian honton.

Sceno naŭa

GEORGO DANDIN, *sola*.

Ha, kiel mi . . . Vi ĝin volis, vi ĝin volis, Georgo Dandin, vi ĝin volis! Ĝi konvenas al vi bone, kaj vi estas ĝuste aranĝita: vi havas juste tion, kion vi meritis. Nu, oni devas nur malfermi la okulojn al la patro kaj al la patrino; eble mi trovos ian rimedon, por tion atingi.

Nova Esperanto-Biblioteko

Biblioteka Główna UMK



300001779043 ✓

- resumo
Laŭ
o 1917.
de la
r" de
- No. 5. **Argus**: Pro kio? Internacia kriminalromano originale verkita.
- No. 6. **Heine**, Heinrich: Elektitaj Poemoj. El germana lingvo tradukis Friedrich Pillath. Dua, kompletigita eldono.
- No. 7. **William**, P.: Legolibro. Ia volumo: Internacia Anekdotaro.
- No. 8. **Hauff**, Vilhelmo: La kantistino. Novelo. El germana lingvo tradukis Eugen Wüster
- No. 9. **Lessing**, Gotthold Ephraim: Natan la Saĝulo. Drameca poemo en kvin aktoj. El germana lingvo tradukis K. Minor.
- No. 10. **Elin-Pelin**: Elektitaj Rakontoj kaj Proz-versaĵoj. El la Bulgara tradukis Ivan H. Krestanoff. (En preparo.)

Prezoj laŭ nia plej nova katalogo.
(La kolekto estas daŭrigota.)

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.
Berlin kaj Dresden

ESP

Biblioteka
Główna
UMK Toruń

702450

No. 1.

No. 2. 24

tradukitaj el dana lingvo de
Fr. Skeel-Giörling.

No. 3. Bona Sinjorino, novelo
de E. Orzeszko, tradukita el
pola lingvo de Kabe.

No. 4. Rusaj Rakontoj, de
Mamin Sibirjak, tradukitaj el
rusa lingvo de N. Kabanov.

No. 5. Don Kihoto en Barcelo-
lono, tradukita el hispana
lingvo de Fr. Puluja y Vallès.

No. 6. El la Biblio, trad. Dro
L. L. Zamenhof.

No. 7. El Dramoj (fragmentoj),
tradukitaj el germana lingvo
de Dro L. L. Zamenhof.

No. 8. El Komedioj (fragmen-
toj), esperantigitaj de Dro
L. L. Zamenhof.

No. 9. Praktika Frazaro. Dia-
logoj de la ĉiutaga vivo, kun-
metis J. Borel.

No. 10/11 (duobla numero). Ja-
panaj Rakontoj. El Japana
lingvo kunmetis Ĉif Toŝio.

No. 12. Reaperantoj. Familia
dramo de Henrik Ibsen (1a
akto), trad. el norvega lingvo
de O. Bünemann.

No. 13. Bulgaraj Rakontoj, el
bulgara lingvo tradukis At.
D. Atanasov.

No. 14/15 (duobla numero).
Amoro kaj Psiĥe de Lucius
Apulejus, el latina lingvo trad.
Emilo Pfeffer.

No. 16. Komerca Korespondo,
kunmetis J. Borel.

No. 17. Konsiloj pri Higieno,
tradukis J. Borel.

Prezoj laŭ nia plej nova katalogo. La kolekto estas daŭrigota. Kelkaj nu-
meroj estas provizore elĉerpitaj, sed ili estos represataj unu post la alia.

Ĉiu libreto enhavas 40—50 paĝojn

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel GmbH., Berlin kaj Dresden

in angla lingvo tradukis
Kellermann, A. M., Ph. Dr.

No. 19. Sinjoro Herkules.
Unuakta burleskaĵo de Georg
Beltij, el germana lingvo tra-
dukis H. Arntz kaj M. Butin.

No. 20. La lasta Usonano de
J. A. Mitchell, el la angla
lingvo trad. Lehm. Wendell.

No. 21. Hungaraj Rakontoj de
Ferenc Herczeg, el hungara
lingvo trad. A. Panajott.

No. 22. Nord-germanaj Ra-
kontoj de Heinrich Bandlow,
el platgermana lingvo tradukis
Ella Scheerpeltz.

No. 23. Hispanaj Dramoj de
Jacinto Benavente, tradukis
Vicente Inglada.

No. 24. La Instituto Milner de
Jean Jullien. Trad. el franca
Lingvo la Lyon-a grupo.

No. 25. Noveletoj el la Nigra
Arbaro de Hel. Christaller.
Trad. el germana lingvo Wilh.
Christaller.

No. 26. La intervidiĝo kaj
Nekonita Dialogo de Alfred
de Vigny, el franca lingvo
trad. Sam. Meyer.

No. 27. La Patrino de E. Zahn.
El la Germana trad. J. Šmid.

No. 28. Elzasaj Legendoj. El
germana lingvo tradukis Char-
lotte Pulvers.

No. 29/31 (triobla numero). Sub la
Neĝo. Taglibro de juna loĝanto
de la Jura-montaro de J. J. Por-
chat, el la Franca trad. J. Borel.

No. 32. La Amkonkurantoj
de Reinhold Schmidt. Triakta
komedio originale verkita.